

Se poser sans s'opposer
S'exposer sans s'imposer

ISSN 0995-6255

Stariĝi sen kontraŭstari
Elmeti sin sen altrudi sin

ESPERANTO - 95

Revue trimestrielle bilingue

Dulingva trimonata revuo



Un Chef d'Etat assiste à un congrès Universel d'espéranto. Fidel Castro au 75ème C.U. à la Havane du 15 au 21 juillet 1990. Voir page 31.

Ŝtatestro ĉeestas E.Universala Kongreso. Fidel Castro dum la 75a U.K. en la Havano, de la 15a ĝis la 21a de julio 1990. Vidu paĝon 31.

Abonnement 1 an : 6,2 Ecus

Jarabono : Landoj de la Eŭropa Komunumo : 6,2 Ekuoj

Prix du numéro : 12 FF

Aliaj :

7 Ekuoj.

ESPERANTO-95
8, rue de l'Eglise
F-95520 Osny

C.C.P./P.C.K. La Source 35 766 17 T

Numéro 8
4ème trimestre 1990

Numero 8
4a trimestro 1990

L'espéranto, langue universelle ?

Un de nos lecteurs nous écrit qu'il s'insurge de voir le qualificatif d'universelle encore appliqué à notre langue. Compte-tenu du nombre relativement peu élevé des espérantistes et du faible retentissement de l'espéranto, il y voit là la marque d'une prétention absolument insoutenable.

Selon nous, bien que nous ne l'utilisions jamais, ce mot n'a rien qui puisse choquer, quand on en connaît la signification et la portée.

Malheureusement, cette expression a, dans l'esprit de certains linguistes et de quelques philosophes, un sens totalement différent qui excite leurs sarcasmes et plonge le public dans le doute sur les possibilités de l'espéranto et sur le sérieux de ceux qui le défendent.

On sait que c'est dans une lettre au Père Mersenne, en date du 20 novembre 1629, que Descartes, après avoir commenté un projet de langue universelle que lui avait communiqué le célèbre ecclésiastique, va plus loin et envisage d'établir "un ordre entre toutes les pensées qui peuvent entrer en l'esprit humain, de même qu'il y en a un naturellement établi entre les nombres, et comme on peut apprendre en un jour à nommer tous les nombres jusques à l'infini et à les écrire en une langue inconnue qui sont toutefois une infinité de mots différents, qu'on pût faire le même de tous les autres mots nécessaires pour exprimer toutes les autres choses qui tombent en l'esprit des hommes (...) L'invention de cette langue dépend de la vraie philosophie".

Il voyait là "une langue universelle(...), qui aiderait au jugement, lui (= celui qui la posséderait) représentant si distinctement toutes choses qu'il lui serait presque impossible de se tromper".

Certains visionnaires même sont allés plus loin et ont pensé (c'était l'époque où l'on commençait à envisager la pluralité des mondes habités) qu'une telle langue pourrait permettre un jour la communication avec ces populations présumées.

Est-ce là le rêve des espérantistes ? Certainement pas. Pour eux, "langue universelle" est synonyme de "langue internationale auxiliaire", d'interlangue véhiculaire, et ne veut pas dire "langue unique de l'humanité". Il n'entre pas dans leur esprit - le répèterons-nous assez ? - de faire disparaître les langues existantes.

Sans doute "langue mondiale" serait mieux approprié. Mais ne pêchons pas par excès de modestie. Le fait que dans plus de cent pays répartis sur les cinq continents (notre univers !) se trouvent des gens, appartenant à toutes les couches sociales, qui la pratiquent avec enthousiasme, suffit pour justifier ce qualificatif.

C. Cavalieri

Esperanto, universala lingvo ?

Iu el niaj legantoj skribas al ni, ke li indignas pri la kvalifikilo *universala* ankoraŭ almetita al nia lingvo. Kalkulinte la nombron relative malaltan de la esperantistoj kaj la malgrandan bruon ĉirkaŭ Esperanto, li vidas en tio la markon de pretendo absolute neeltenebla.

Laŭ ni, kvankam ni neniam uzas ĝin, tiu vorto havas nenion, kiu povu sentofendi, kiam oni konas ĝian signifon kaj ĝian trafpovon.

Bedaŭrinde tiu esprimo havas en la spirito de iaj lingvistoj kaj de kelkaj filozofoj sencon tute malsimilan, kiu incitas iliajn sarkasmojn kaj jetas la publikon en dubon pri la eblecoj de Esperanto kaj pri la seriozeco de tiuj, kiuj defendas ĝin.

Oni scias, ke estas en letero al Patro Mersenne [Mersen] datita de la 20a de novembro 1629, kiam Descartes [Dekart], komentariinte projekton pri tutmonda lingvo, kiun transdonis al li la fama ekleziulo, pluiras kaj konsideras la eblecon starigi "ordon inter ĉiuj pensoj, kiuj povas eniri la homan spiriton same kiel estas unu nature starigita inter la nombroj kaj, kiel oni povas lerni en unu tago nomi ĉiujn nombrojn ĝis la infinito kaj skribi ilin en nekonata lingvo, kiuj tamen estas senlimaj malsimilaj vortoj, tial, ke oni povu fari la samon per ĉiuj aliaj necesaj vortoj por esprimi ĉiujn aliajn aferojn, kiuj enfalas en la spiriton de la homoj (...) La elpensado de tia lingvo dependas de la pura filozofio"

Li vidis en tio "lingvon universalan, (...) kiu helpus por la juĝo, montrante al li (= tiu, kiu scipovus la lingvon) tiom distinkte ĉiujn aferojn, ke estus al li preskaŭ neeble erari.

Iuj viziuloj eĉ, iris pluen kaj pensis (estis la epoko kiam oni komencis konsideri la plurecon de la loĝataj mondoj), ke tia lingvo povos permesi iam la interkomunikadon kun tiuj loĝantaroj supozitaj.

Ĉu estas tio la revo de la esperantistaro ? Certe ne ! Por ili, lingvo universala estas sinonimo de " helpa lingvo internacia, de interlingvo vehikla", kaj ne signifas "homara lingvo unika". Ne enkapiĝas ĉe ili - ĉu ni ripetos tion sufiĉe ? - malaperigi la ekzistantajn lingvojn.

Verŝajne "monda lingvo" estus pli taŭge. Sed ni ne peku pro troa modesteco. La fakto, ke en pli ol cent landoj dislokitaj sur kvin kontinentoj (nia universo !) troviĝas homoj apartenantaj al ĉiuj sociaj tavoloj, kiuj uzas ĝin entuziasme, sufiĉas por pravigi tiun kvalifikilon .

C. Cavalieri

Les grandes figures du mouvement espéranto.

Kalman Kalocsay (1891-1976)

Après Baghy, nous présentons aujourd'hui une autre grande figure littéraire, Kalman Kalocsay (pron. Kalotcai), considéré pour beaucoup comme le plus grand poète d'expression espéranto.

Kalman (Kolomano pour les espérantistes) Kalocsay est né le 5 octobre 1891 (donc la même année que Baghy) à Abaujszanto (Hongrie). Docteur en médecine en 1916. Sert 3 ans comme médecin militaire, puis démobilisé, à l'hôpital Laszlo pour maladies infectieuses, de Budapest. Nommé chef de service en 1929 il y terminera sa carrière médicale en 1967. Entretemps il avait été nommé (en 1929) professeur de médecine à la Faculté de Budapest.

Espérantiste depuis 1911, Académicien depuis 1949, rédacteur en Chef de l'importante revue littéraire "Literatura Mondo", il fut l'une des principales figures de la poésie en espéranto.

Son oeuvre, originale, mais surtout traduite, est immense. Il suffit de jeter un coup d'oeil sur la bibliographie qui suit.

"A un tel amateur de mots, écrit son grand ami Gaston Waringhien dans l'Encyclopedie d'espéranto (1934), tout trésor (= ressources lexicales) paraît maigre. C'est pourquoi il a tendance à choisir dans les principales langues européennes, dont une vaste mémoire lui permet l'acquisition, les mots les plus expressifs, les plus pittoresques. De ces néologismes, sans doute plus d'un déperira et ne restera que comme "kalocsayisme", mais les autres s'enracineront et nous lui serons redevables un jour de la même dette que les Italiens pour Dante ou les Français pour Ronsard." (1)

Après la période de la guerre froide pendant laquelle il ne publia rien, il se tourna vers l'oeuvre du grand dramaturge anglais William Shakespeare dont il traduisit "Le Roi Lear", en 1956, "Le Songe d'une nuit d'été" en 1957 et "La Tempête" en 1971. "Ces trois traductions prouvent brillamment les possibilités de la langue poétique espéranto - surtout le Roi Lear - , en fait ils sont le point culminant de l'art de la traduction en espéranto de ces dernières décennies" (Vilmos Benczik).

La eminentuloj de la Esperanta Movado.

Kalman Kalocsay (1891-1976)



Post Baghy, ni prezentas hodiaŭ alian beletran eminentulon, Kalman Kalocsay (Kaloĉai), konsiderata de multaj kiel la plej granda Esperanta poeto.

Kalman (Kolomano por la esperantistaro) naskiĝis la 5an de oktobro 1891 (do la saman jaron kiel Baghy) en Abaujszanto (Hungario). Doktoro de medicinaj sciencoj en 1916. Dejoras dum 3 jaroj kiel militista kuracisto, poste malmobilizita, en la Hospitalo Laszlo por Infektaj Malsanoj, de Budapeŝto. Nomumita Sekciestro en 1929, li finos tie sian medicinan karieron en 1967. Intertempe, li estis nomumita (en 1929) profesoro pri medicino ĉe la Budapeŝta Fakultato.

Esperantisto de 1911, Akademiano de 1949, Ĉefredaktoro de la grava beletra revuo

"Literatura Mondo", li estis unu el la ĉefaj figuroj pri Esperanta poezio.

Lia verkaro, originala, sed precipe tradukita, estas grandega. Sufiĉas ekrigardi al la sekvanta bibliografio.

"Al tia vortamatoro, skribas lia granda amiko Gaston Waringhien, en la Enciklopedio de Esperanto (1934), ĉia trezoro ŝajnas malmulta. Tial li emas elekti en la eŭropaj ĉeflingvoj, kies povoscion ebligas al li vasta memoro, la plej drastajn, la plej pitoreskajn vortojn; el tiuj neologismoj, certe pli ol unu velkos kaj restos nur kiel "kalocsajismoj", sed la ceteraj enradikiĝos, kaj al li iam ni suldos la saman ŝuldon, kiel la Italoj al Dante, kaj la Francoj al Ronsard".(1)

Post la periodo de la malvarma milito, dum kiu li publikigis nemon, li turnis sin al la verkaro de la granda angla dramisto William Shakespeare, el kiu li tradukis "Reĝo Lear", en 1956, "Somermeznokta Sonĝo", en 1957 kaj "La Tempesto", en 1971. "Tiuj ĉi tri tradukoj brile pruvas la kapablojn de la Esperanta poezia lingvo - precipe Reĝo Lear - fakte ili estas la elpintigo de la Esperanta tradukarto de la lastaj jardekoj"; (Vilmos Benczik).

*Angla titolo: A Midsummer Night's Dream (C.C.)

Mais l'activité de Kalocsay ne s'est pas limitée à l'expression poétique. Il a aussi laissé une oeuvre importante dans le domaine de la linguistique. Dans son essai "Lingvo Stilo Formo, (1931), dans les trois séries de "Literatura Mondo", il a exprimé des idées pleines de sagacité et de pertinence sur de nombreux points obscurs de la grammaire et du style (le mode du verbe après kvazaù, la terminaison en a des noms propres féminins, ses travaux sur la composition des mots etc). Avec Waringhien il a écrit deux livres très importants. "Parnasa Gvidlibro" (traité de versification) (1932) (auquel a également collaboré Roger Bernard) et la "Plena Analiza Gramatiko de Esperanto". La petite guerre que se sont livrée quelque temps certains théoriciens au sujet des participes ne l'a pas laissé indifférent, d'où sa contribution à l'ouvrage collectif "Simpozio pri ata/ita" et son "Vojago inter la tempo" (1966).

Kalman Kalocsay est mort à Budapest le 27 février 1976. Un grand nombre d'espérantistes endeuillés venus de tous les pays ont accompagné ses cendres au cimetière de Aszod.

Kalocsay avait utilisé les pseudonymes de C.E.R. Bumy, de Peter Peneter et Georgo Peterido Peneter.

(1) Voir en page 5 l'opinion de Kalocsay lui-même sur les néologismes.

-o-o-o-o-o-o-o-o-

Oeuvres de K. Kalocsay

-o-o-o-

Poésie. Poèmes originaux.

Mondo kaj Koro (1921)
 Kantanta Kamparo (1923)
 Streĉita Kordo (1931)
 Rimportretoj (1931)
 Sekretaj Sonetoj (1932)
 (sous le pseudonyme de Peter Peneter)
 Deuxième édition sous le titre de :
 Libro de Amo, et le pseudonyme de
 Georgo Peterido Peneter

Traductions.

Johano la Brava (d'après Petöfi) (1923)
 La tragédie de l'Homme, d'après Madach)
 (1924 - Nouv. éd. 1965)
 L'Enfer (d'après Dante) (1933).
 Le Roi Lear (d'après Shakespeare)(1956)
 Le Songe d'une nuit d'été (idem)(1957)
 La Tempête (idem)(1971)
 Tutmonda Sonoro (posthume : 1981)
 (Anthologie : 581 poèmes de 185 poètes)

Traductions en collaboration

Les Fleurs du mal (Baudelaire)
 Chants et Romances (Henri Heine)

Ouvrages de linguistique

Lingvo Stilo Formo (essais) (1931)
 Parnasa Gvidlibro (1932)
 Plena analiza Gramatiko (1935)
 Vojago inter la tempo (1966)
 Partie grammaticale de l'Encyclopédie
 d'Espéranto (1934)

Sed la aktiveco de Kalocsay ne limigis je la poezia esprimiĝo. Li ankaŭ lasis gravan verkaron en la lingvistika kampo. En sia eseero "Lingvo Stilo Formo" (1931), en la tri serioj de "Literatura Mondo", li esprimis ideojn sagacplenajn kaj trafajn pri multaj nebulaj punktoj en la gramatiko kaj la stilistiko (verba modo post kvazaù, la a-finaĵo post la virinaj propraj nomoj, propraj laboroj pri la vortfarado, ktp.) Kun Waringhien, li skribis du gravegajn verkojn. "Parnasa Gvidlibro" (traktato pri versfarado) (1932) (al kiu ankaŭ kunlaboris Roger Bernard) kaj la "Plena Analiza Gramatiko". La eta milito, kiun faris kelkatempe unu kontraŭ la alia kelkaj teoriuloj pri participoj ne lasis lin indiferenta, el kio sekvis lia kontribuo al la kolektiva verko "Simpozio pri ata/ita" kaj lia "Vojago inter la tempo" (1966).

Kalman Kalocsay mortis en Budapesto la 27 an de februaro 1976. Multaj esperantistoj funebrantaj venintaj el ĉiuj landoj akompanis liaj cindrojn al la tombejo de Aszod.

Kalocsay uzis la pseŭdonomojn C.E.R. Bumy, Peter Peneter kaj Georgo Peterido Peneter.

(1) Vidu paĝon 5, la opinion de Kalocsay mem pri la neologismoj.

-o-o-o-o-o-o-o-o-

Verkoj de K. Kalocsay

-o-o-o-

Poezio. Originalaj poemoj.

Mondo kaj Koro (1921)
 Kantanta Kamparo (1923)
 Streĉita Kordo (1931)
 Rimportretoj (1931)
 Sekretaj Sonetoj (1932)
 (Sub la pseŭdonomo Peter Peneter)

Dua eldono, sub la titolo :
 Libro de Amo, kaj la pseŭdonomo
 Georgo Peterido Peneter

Tradukoj.

Johano la Brava (laŭ Petöfi) (1923)
 La tragedio de l'Homme, laŭ Madach)
 (1924 - Nova eld. 1965)
 L'Infero (laŭ Dante) (1933)
 Reĝo Lear (laŭ Shakespeare)(1956)
 Somermeznokta Sonĝo (same)(1957)
 La Tempesto (same)(1981)
 Tutmonda Sonoro (postmorta : 1981)
 (Antologio : 581 poemoj el 185 poetoj)

Tradukoj kunlabore.

La Floroj de l'Malbono (laŭ Baudelaire)
 Kantoj kaj Romancoj (laŭ H. Heine)

Lingvistikaj verkoj.

Lingvo Stilo Formo (esearo) (1931)
 Parnasa Gvidlibro (1932)
 Plena Analiza Gramatiko (1935)
 Vojago inter la tempo (1966)
 Gramatika parto de la Enciklopedio de
 Esperanto (1934)

Pour présenter quelques facettes du talent de Kalocsay nous avons choisi trois échantillons : son article sur les néologismes, extrait de l'Encyclopédie d'Espéranto, un poème traduit de Baudelaire et une poésie originale (une fable inspirée d'Esopo).

Les néologismes d'après Kalocsay.

On appelle néologisme tout mot non officiel, jusqu'à son homologation. Conformément à l'évolution libre de l'espéranto tout espérantiste peut introduire un néologisme. C'est l'ensemble des espérantistes qui décide du succès du nouveau mot par son emploi ou par indifférence. Quant aux néologismes, deux points de vue contradictoires s'affrontent : celui de la simplicité et de la facilité et celui de la richesse et de la capacité littéraire de la langue. Les oppositions ne semblent pas conciliables car ni la propagande ne peut abandonner la grande force d'attraction de la facilité et de la simplicité, ni la littérature (abandonner) la force d'expression et la richesse du vocabulaire sans lesquelles une vraie littérature transmettant non seulement la pensée sans ornements, mais encore des nuances délicates, des mots dans des emplois métaphoriques, des allusions voilées contenues dans des mots, est et reste un beau rêve.

Le problème ne paraît soluble que par la séparation des "mots poétiques" c.-à-d. les mots utilisés seulement dans la grande littérature. Ces mots devraient, au moins provisoirement, être expliqués dans une liste, à la fin de chaque livre. Ainsi, la langue vulgaire pourrait rester désencombrée de l'évolution littéraire de la langue. Les mots poétiques, à signaler dans tout dictionnaire par une vignette, devraient être appris des seuls espérantistes à tendances littéraires et cet apprentissage serait facilité si chaque oeuvre était en édition commentée. De plus devrait cesser l'antipathie de principe et aiguisée par certains, contre la richesse du vocabulaire poétique (et remplacée) par la reconnaissance du fait qu'une littérature et une pauvreté voulue du vocabulaire sont des concepts qui se contredisent mutuellement.

Les principes d'après lesquels l'adoption de nouveaux mots se produit sont les suivants :

1.- Pour éviter, dans les mots très employés des composés pesants (voir le texte ci-contre : fouler aux pieds, bousculer, descendre, fard).

2.- Pour distinguer des nuances (tomber et s'affaisser, ou tomber dans les bras de quelqu'un, japper et aboyer, langueur et lassitude, charger, fondre sur et attaquer).

3.- Pour exprimer des idées qui ne peuvent l'être que par plusieurs mots (jachère : champ provisoirement non cultivé ; figurant : acteur jouant un rôle accessoire ; contempler : regarder longuement et en méditant ; se cabrer : se dresser sur les pattes de derrière).

4.- Pour remplacer dans les mots souvent utilisés des composés en mal- (stupide, se quereller, éphémère ; affliger ; complexe ; humide ; rare ; triste ; dur ; doux).

5.- Simplifier des mots à pseudosuffixes (appel, en justice, faire appel - situation, situer - décoration, décorer - fédération, fédérer - érudition, enseigner à fond et en détail (PIV) - éruption entrer en éruption - proscription, proscrire) On pourrait ici mentionner également les mots docte

Por prezenti kelkajn facetojn de la Kalocsaja talento, ni elektis tri specimenojn : lian artikolon pri neologismoj, eltiritan el la Enciklopedio de Esperanto, poemon tradukitan de Baudelaire kaj originalan poeziaĵon (fabelon inspiritan de Ezopo).

La neologismoj, laŭ Kalocsay.

Neologismo estas nomata ĉiu vorto neoficiala, ĝis sia oficialigo. Konforme al la libera evoluo de E, neologismon povas enkonduki ĉiu E-isto : pri la prospero de la nova vorto decidas la E-istaro, per ekuzo aŭ per ignoro. Rilate al la neologismoj kolizias du vidpunktoj inter si kontraŭaj : tiu de la simpleco kaj facileco kaj tiu de la riĉeco kaj literatura taŭgeco de la lingvo. La kolizio ŝajnas nerepacigebla, ĉar nek la propagando povas rezigni pri la granda altirforto de la facilco kaj simplco, nek la literaturo pri la esprimforto kaj vortriĉo, sen kiuj vera literaturo, transdonanta ne nur la nudan penson, sed ankaŭ delikatajn nuancojn, metaforajn vort-aplikojn, duonklarajn aludojn entenatajn de vortoj, estas kaj restas nur pia revo.

La problemo ŝajnas solvebla nur per la apartigo de la "poeziaj vortoj" t.e. vortoj uzataj nur en la alta literaturo. Ĉi tiujn vortojn, almenaŭ provizore oni devus klarigi fine de ĉiu libro, en listo. Per tio la vulgara lingvo povus resti neembarasata de la literatura lingvo-evoluo ; la poeziajn vortojn, signendajn en ĉiu vortaro per vinjeto, devus lerni nur literaturoema E-isto, kaj ĝi tiun lernon plifaciligus, ke ĉiu verko estus klarigita eldono. Krome, devus ĉesi la principa, kaj de kelkaj intence pliakrigata antipatio kontraŭ la poezia vortriĉo, per la rekono, ke literaturo kaj intenca vortmalriĉo estas konceptoj kontraŭdirantaj unu al la alia (...)

La principoj, laŭ kiuj la alprenado de novaj vortoj okazas, estas la jenaj :

1.- Eviti, ĉe ofte uzataj vortoj, pezajn vortkunmetojn (piedpremi : trei ; falpuŝigi : stumbli ; malsupreniri : descendi ; vizagŝmirajo : ŝminko).

2.- Distingi nuancojn (fali kaj sinki) ; jelpi kaj boji ; langvoro kaj laco ; sturmi kaj ataki).

3.- Signi ideojn, esprimeblajn nur per pluraj vortoj (novalo : provizore nekulturata plugteroj ; statisto : akcesora rolo ; kontempli : longe kaj medite rigardi ; baŭmi : starigi sur la postaj piedoj).

4.- Anstataŭigi, ĉe ofte uzataj vortoj, mal-kunmetojn (stulta : malsprita ; kvereli : malpaci ; efemera : maldaŭra ; aflikti : malĝojigi ; kompleksa : malsimpla ; humida : malseka ; rara : malofta ; trista : malgaja ; dura : malmola ; milda : malsovaga).

5.- Simpligi pseudosufiksajn vortojn (apelacio : apeli ; situacio : situi ; dekoracio : dekori ; federacio : federati ; erudicio : erudi ; erupcio : erupti ; proskripcio : proskribi). Tie ĉi oni povus menci ankaŭ la vortojn : dokta el doktoro ; mimo el mimiko ; anatomo el anatomio ; beletrio el beletristiko ; biologo el biologio ; gimnasto el gimnastiko ; geografo el geografio ; geometro el geometrio, ktp.

de docteur - mime de mimique - anatomiste, de anatomie - belles-lettres, de histoire littéraire - biologiste, de biologie - gymnaste, de gymnastique - géographe, de géographie - géomètre, de géométrie.

6.- Bien que jusqu'à présent non entrée dans la pratique, une voie à suivre un jour serait d'individualiser quelques pseudoaffixes. Neergaard propose, par exemple, le suffixe *ik* pour indiquer une profession (métier de danseur, profession de journaliste)(1). De même, on pourrait, des mots pré-lude, prétekste, prescrire, tirer le "préfixe" pré pour dire prédiction, prévision. De grotesque, être phosphorescent, arabesque, on pourrait tirer le "préfixe" *esk-* (à la japonaise, aux allures viriles, en parlant d'une femme, aux allures efféminées)(2). De *malgraŭ* (malgré) on pourrait tirer la préposition *graŭ* (au gré de, pour le bien de ...). Mais c'est là, vraiment "la musique de l'avenir".(3)

7.- De plus, par la diffusion de l'espéranto, on sentira certainement de plus en plus le besoin de mots familiers dont quelques-uns ont déjà été proposés dans le Parnasa Gvidlibro (*kaputa* : rompu, ruiné ; *fatraso* : fatras ; *trampo* : clochard ; *paŭti* : bouter ; *mungi* : se moucher ; *maroto* : marotte).

(1) On sait que la tendance actuelle est de donner à ce suffixe la signification de science, art ou technique. Ex; *Stilistiko*, *metodiko*, *fonemiko*. Malheureusement parmi le millier de mots qui se terminent en *-iko* les deux tiers ne sont ni des sciences, ni des arts (Voir le texte ci-contre : *chou*, *ami*, *mistification* etc).

(2) Est-ce que *-eska* dit plus que *-eca* ? Est-ce que *silkeska* est meilleur que *silkeca* ?(soyeux)

(3) Cela n'est pas tombé dans l'oreille d'un sourd. Et l'on sait que les Académiciens connaissent bien " la musique de l'avenir" ... (Notes de C.C.)

Un poème de Baudelaire : l'Albatros.

Souvent, pour s'amuser, les hommes d'équipage
Prennent des albatros, vastes oiseaux des mers,
Qui suivent, indolents compagnons de voyage,
Le navire glissant sur les gouffres amers.

A peine les ont-ils déposés sur les planches,
Que ces rois de l'azur, maladroits et honteux,
Laissent piteusement leurs grandes ailes blanches
Comme des avirons traîner à côté d'eux.

Ce voyageur ailé, comme il est gauche et veule !
Lui naguère si beau, qu'il est comique et laid !
L'un agace son bec avec un brûle-gueule,
L'autre mime, en boitant, l'infirme qui volait !

Le Poète est semblable au prince des nuées
Qui hante la tempête et se rit de l'archer ;
Exilé sur le sol au milieu des huées,
Ses ailes de géant l'empêchent de marcher.

Les Fleurs du Mal

6.- *Kvankam ĝis nun ne praktikata, eble foje* irota vojo estus la memstarigo de kelkaj pseŭdoafiksoj. Neergaard proponas, ekzemple, la sufikson *ik* por signi profesion (danciko, jurnaliko) (1). Same oni povus el la vortoj preludo, preteksto, preskribi gajni la prefikson *pre*, por diri prediro, prevedo. El groteska, fosforeski, arabesko, oni povus gajni la sufikson *esk*. (japaneska, vireska, virineska)(2). Oni povus fari el *malgraŭ* la prepozicion *graŭ* (laŭ la volo, por la bono de). Sed tio estas vere la "muziko de l'estonteco"(3).

7.- Krome per la plivastigo de E, oni certe pli kaj pli sentos la neceson de familiaraj vortoj, el kiuj oni jam proponis kelkajn en la Parnasa Gvidlibro (*kaputa* : rompiĝinta, ruiniĝinta ; *fatraso* : aĉajaro ; *trampo* : ĉifona malzorgita ulo ; *paŭti* : malkontente silentadi ; *mungi* : nazpurigi ; *maroto* : amata ĉevaletto).

(1) Oni scias, ke la nuna tendenco estas doni al tiu sufikso la signifon de scienco, arto aŭ tekniko. ex. *stilistiko*, *metodiko*, *fonemiko*. Bedaŭrinde el la milo da vortoj, kies finaĵo estas *-iko*, la du trionoj ne estas sciencoj nek artoj (*brasiko*, *amiko*, *maniko*, *mistifiko*, ktp,)

(2) Ĉu *-eska* diras pli ol *-eca* ? Ĉu *silkeska* estas pli bona ol *silkeca* ?

(3) Tio ne trafis surdulan oreilon. Kaj oni scias, ke la Akademianoj bone konas la "muzikon de la estonteco" ... (Notoj de C.C.)

Poemo de Baudelaire : la Albatro (1)

Kelkfoje, por amuzo, ŝipanoj kapt-akiras
Albatrojn, ĉi grandegajn ventbirdojn de la mar',
Kiu, indiferentaj vojaĝkunuloj, iras
Post ŝip' glitanta super amara abismar'.

Apenaŭ ili estas metitaj ŝipoplanke,
Ĉi regoj de l'lazuro, mallerte kaj kun ĝen'
Grandajn flugilojn blankajn jen trenas ambaŭflanke,
Kiel remilojn pezajn, kun kompatinda pen'.

Ĉi vojaĝant' flugila inerte nun hezitas,
Jus nura bel' kaj nune : malbel' komika jam.
Jen, iu ĝian bekon per kurba pip' incitas,
Alia ĝin, fluginton imitas dum la lam'.

Similas la poeto al tiu princ' de l' nuboj,
Kiu la ŝtormon ĝuas, kaj ridas je l'pafant',
Kaj kiun, tere, sube, ĉe mokrideg' de buboj,
Malhelpas iri ĝiaj flugiloj de gigant'.

La Floroj de l' Malbono

Tradukis Kolomano Kalocsay

(1) Albatro estas kreaĵo de Kalocsay. La normala vorto estas : Albatroso (C.C.).

Une fable d'Esopé

- O - O - O - O - O -

*Quelque part, le cheval et le boeuf
Se prirent vertement de querelle
Sur leur mérite
En temps de guerre.*

*Avec irritation, le cheval déclara :
" Eh ! Il serait insensé
De mettre en doute notre gloire
Et notre mérite.
Aux combats
Les chevaux
Ont toujours été prêts à courir
Au son
De la trompette.
(Les éperons aussi y ont aidé)
Et qui traîna
Le fardeau des canons
A travers les pierres inégales ?
Nous seuls !" hennit le cheval*

*Le boeuf répondit en ruminant :
" Canasson !
Tu fais le flambard pour rien,
Car c'est bien nous
Qui rendons le plus grand service !
Le général en chef a beau se rompre
La cervelle,
En vain le courage
Est héroïque
Quand la pitance
Manque.
Et à qui est reconnaissant
Pour la viande, le soldat qui a faim ?
Au boeuf que l'on méprise !
Ta gloire n'est qu'apparente,
Le boeuf remporte toutes les victoires.*

*Mélancoliquement,
L'âne aussi broutait là.
Il entendit avec déplaisir
Qu'ils se glorifiaient.
Il se mit à braire
Et à balayer l'air
De ses oreilles,
Et il s'écria : " Balivernes !
Voici la vérité :
Si sur terre
Les ânes ne s'attroupaient pas,
La guerre même n'aurait pas lieu !"*

Koloman Kalocsay

Traduction de C.C.

Ezopa fablo

- O - O - O - O - O -

La ĉeval' kaj bovo ie
Ekdisputis energie
Pri l' merito
En milito.

Diris la ĉeval' incite :
"Eh, malsprite
Estus dubi nian gloron
Kaj valoron.
La ĉevaloj
Al bataloj
Kuri ĉiam estis pretaj
Je l' trompetaj
Sonoj.
(Iom helpis ankaŭ spronoj)
Kaj la ŝarĝon de l'kanonoj
tra abruptaj ŝtonoj
Kiu trenis ?
Nur ni !" - la ĉevalo henis.

Bov' respondis dum remaĉo :
"Ĉevalaĉo !
Vi ja vane fanfaronas,
Ĉar ni donas
Tamen la plej grandan servon !
Ja al si la cerbon
La marŝalo vane rompas,
Vane pompas
La kuraĝo
Se l'furaĝo
Mankas.
Kaj al kiu dankas
La viandon la soldat' malsata ?
Al la bovo malŝatata !
Via gloro sole ŝajnas,
Ĉiun venkon bovo gajnas".

Paŝtis sin melankolie
Ankaŭ la azeno tie.
Ĝi malplaĉe aŭdis,
Ke sin ili laŭdis.
Ĝi iais
Kaj balais
La aeron per oreloj,
Kaj ekkriis : "Bagateloj !
Jen la vero :
Sur la tero
Se azenoj ne amasus,
La milit' eĉ ne okazus !"

Kolomano Kalocsay.

Points de repère historiques du Mouvement Espéranto.

Comme d'habitude, notre quatrième numéro de l'année sera consacré à une revue de presse des années considérées. Mais du fait qu'il y a 75 ans (1915) et 50 ans (1940), les journaux *espérantistes* avaient pour la plupart et pour des raisons évidentes, cessé de paraître, nous négligerons ces deux années-là.

Il y a cent ans. 1890.

Dans "la *Esperantisto*" N-ro 5 du 25 février 1890.

"Où réside la cause de la trop lente progression de notre affaire ? Est-ce que le nombre des *espérantistes* existants a déjà atteint le nombre des *idéalistes* auxquels notre affaire pourrait plaire et qu'elle pourrait enthousiasmer ? Est-ce que hors du nombre actuel de nos amis, notre affaire rencontre partout indifférence et mépris ? Non, certainement non et pas du tout ! A en juger par les exemples que j'ai vus, je peux dire en toute certitude qu'il existe encore sur terre des millions (de personnes) qui, avec grand plaisir, adhèrent en un seul jour, à notre affaire si ... elles en savaient quelque chose, si on parlait avec elles, si on leur expliquait toute la signification de notre sainte affaire.

Il y a quelques mois, j'étais dans une grande ville. J'ai demandé par hasard à quelqu'un de connaissance que j'y ai, quelle opinion il avait sur la langue internationale *Esperanto*. "Quelle Langue internationale ? Quel *Esperanto* ? Qu'est-ce que c'est ?", me demanda-t-il étonné. Je questionnai une autre de mes connaissances - même visage interrogateur - Je me rendis chez un libraire, voulant acheter un manuel en notre langue pour le montrer à mes relations. "L'*Esperanto* ?" fit le libraire. "Qu'est-ce que c'est ? Je n'en ai jamais entendu parler". J'allai chez un deuxième, un troisième, chez tous les libraires de la ville. Partout le même balancement étonné de la tête".

Nil novi sub sole

- o - o - o - o - o - o - o - o - o - o - o - o - o - o - o -

Propos d'un illuminé

A en juger par le flot de néologismes qu'ils sont capables d'imaginer, on est en droit de se demander si nos *Académiciens* parviennent à se comprendre entre eux au cours de leurs séances de travail.

Ceceo

Historiaj signiloj de la Esperanta Movado.

Kiel kutime, nia kvara numero de la jaro estos dediĉita al pririgardo de la gazetaro dum la jaroj koncernataj. Sed pro la fakto, ke antaŭ 75 jaroj (1915) kaj 50 jaroj (1940) preskaŭ ĉiuj E-gazetaroj ĉesis aperi, ni ignoras tiujn du jarojn.

Antaŭ cent jaroj. 1890.

El "La *Esperantisto*", N-ro 5, de la 25 a de februaro 1890.

"Kie kuŝas la kaŭzo de la ne sufiĉe rapida progresado de nia kara afero ? Cu per la certa nombro de la ekzistantaj *Esperantistoj* jam tute finiĝis la nombro de la *idealistoj*, al kiuj nia afero povus plaĉi kaj kiujn ĝi povus entuziasmigi ? Cu ekster la ekzistanta nombro de niaj amikoj nia afero jam renkontas ĉie indiferentecon aŭ malestimon ? Ne, certe ne kaj tute ne ! Juĝante laŭ la ekzemploj kiujn mi vidis, mi povas diri tute certe, ke en la mondo ekzistas ankoraŭ milionoj, kiuj kun granda plezuro en unu tago aliĝus al nia afero, se ... scius pri ĝi, se oni parolus kun ili, se oni klarigus al ili la tutan grandan signifon de nia sankta afero.

Antaŭ kelkaj monatoj mi estis en unu granda urbo. Mi okaze demandis mian tian konaton, kian opinion li havas pri la lingvo internacia *Esperanto*. "Kia Internacia ? Kia *Esperanto* ? Kio tio ĉi estas ?" li demandis mirante. Mi demandis alian konaton, - tiu sama demandanta vizaĝo. Mi iris al libristo, volante aĉeti lernolibron de nia lingvo por montri al miaj konatoj. "*Esperanto* ?!" diris la libristo, - "Kio tio ĉi estas ? mi neniam aŭdis". Mi iris al dua, al tria, al ĉiuj libristoj en la urbo - ĉie tiu sama mirigita balancado de l'kapo."

Nenio nova sub ĉielo ...

- o - o - o - o - o - o - o - o - o - o - o - o - o - o - o -

Diroj de illuminito

Se prijuĝi laŭ la abundo de novismoj, kiujn ili kapablas imagi, oni rajtas demandi sin, ĉu niaj *Akademianoj* sukcesas interkompreniĝi dum siaj laborkunsidoj.

Ceceo

Il y a 25 ans. 1965.

De Esperanto (novembre 1965, page 188).

Esperanto, the Aggressor Language. (La langue de l'agresseur), Ed. Armée des Etats-Unis, Washington. 1962. 233 p. 23x15 cm. Dictionnaire anglais-espéranto et espéranto-anglais avec phraseologie*.

Comme on le sait (sic !) depuis déjà de nombreuses années, l'armée des Etats-Unis utilise l'espéranto comme langue de "l'ennemi" au cours de ses manoeuvres. Qu'on comprenne bien, que pour ce but, il n'est absolument pas nécessaire de se conformer à l'usage international normal, car tous les locuteurs sont des Etats-Uniens. Ce "manuel" met l'accent sur le fait que les utilisateurs ont le droit de modifier la langue selon les besoins locaux. Pas étonnant dès lors, que l'ensemble soit plein d'"américanismes" (des Etats-Unis, évidemment. NdT) Parmi les phrases courantes pour la conversation de tous les jours on lit, par exemple : (Qu'on nous pardonne si nous n'avons pas exactement rendu le sens exact de cet "espéranto" très approximatif...)

Le groupe spécialisé de Transmissions est muni d'un équipement sonore qui permet de produire une variété de bruitages de bataille pour faire croire qu'une petite unité en est une grande. A côté, se trouvent des moyens de guerre psychologique et d'émission de propagande.

V.S.

(* Note : Cette petite information prend aujourd'hui tout son sel quand on sait que l'Irak reste le seul pays au monde où l'espéranto est interdit).

De Heroldo de Esperanto du 16 mars 1965.

Première méthode pour Mongols.

Le Prof d'Université B. Rincen, Membre de l'Académie des Sciences de Mongolie et Membre honoraire de l'Académie de Budapest a fait paraître à la fin de l'année dernière la première méthode d'espéranto pour Mongols sous le titre "Esperanto chel ööröö surach bicig" (Méthode autodidactique d'espéranto). Ainsi que nous avons déjà donné l'information, bientôt paraîtra également un dictionnaire espéranto-mongol et mongol-espéranto.

De Heroldo de Esperanto, du 1er mai 1965.

S.A.T. achète son siège (social).

Se trouvant devant la menace soudaine d'avoir à évacuer son siège à Paris, à la fin de l'année dernière S.A.T. a lancé un appel pour recueillir de l'argent en vue de son acquisition.

En quelques mois tant de dons en espèces ont afflué que le siège a pu aussitôt être acheté.

Antaù 25 jaroj. 1965.

El Esperanto, (novembre 1965, paĝo 188)

Esperanto, the Aggressor Language. (La lingvo de la agresantoj) Eld. Usona Armeo, Vasingtono, 1962. 233 p. 23x15 cm. Vortaro Angla-Ea kaj Ea-angla kun frazaro.*

Kiel konate, jam de multaj jaroj la Usona Armeo aplikas Esperanton kiel lingvon de la "malamikoj" en siaj ekzercaj manovroj. Oni komprenu bone, ke por tiu celo tute ne necesas konformiĝi al normala internacia uzado, ĉar ĉiuj parolantoj estas usonanoj. Tiu ĉi "manlibro" emfazas, ke la uzantoj rajtas modifi la lingvon laŭ lokaj bezonoj. Ne mirinde, ke la tuto estas plena de usonismoj. Inter la "Oftaj Frazoj Por Ĉiutaga Konversacio", ekzemple, oni legas : "Signalo Roto Specialo estas ekipata kun sona ekipaĵo kiu havas kapablo de produktanta sortimento de batala sono por faranta malgranda unito ŝajni granda. Apud, ĝi havas psikologia militado kaj propaganda disvastiga kapablo.

V.S.

(* Noto de C.C.: Tiu malgrava informo alprenas hodiaŭ sian tutan spritajon kiam oni scias, ke Irako restas la nura lando en la mondo, kie Esperanto estas malpermesata).

El Heroldo de Esperanto, la 16an de marto 1965.

Unua lernolibro por mongoloj.

Univ. Prof. B. Rincen, membro de la Scienca Akademio de Mongolio kaj honora membro de la Akademio de Budapest, aperigis fine de pasinta jaro la unuan Esperanto-lernolibron por mongoloj sub la titolo "Esperanto chel ööröö surach bicig" (Aŭto-didakta lernolibro de Esperanto) Kiel ni jam informis, baldaŭ aperos ankaŭ Esperanta-mongola kaj mongola-Esperanta vortaro.

El Heroldo de Esperanto, lan de majo 1965.

S.A.T. aĉetas sian sidejon.

Trovante sin antaŭ subita minaco esti forigita de sia sidejo en Parizo, fine de pasinta jaro, S.A.T. lanĉis alvokon por kolekti monon cele de ĝia aceto.

En kelkaj monatoj alfluis tiom da mondonacoj, ke la sidejo povis esti tuj aĉetita.

Mélanges.

LETTRE D'UN TURC sur les plaisirs et sur son ami Bababec.

Lorsque j'étais dans la ville de Bénarès sur le rivage du Gange, ancienne patrie des brahmanes, je tâchai de m'instruire. J'entendais passablement l'indien ; j'écoutais beaucoup et remarquais tout. J'étais logé chez mon correspondant Omri ; c'était le plus digne homme que j'aie jamais connu. Il était de la religion des bramins, j'ai l'honneur d'être musulman : jamais nous n'avons eu une parole plus haute que l'autre au sujet de Mahomet et de Brama. Nous faisons nos ablutions chacun de notre côté, nous buvions de la même limonade, nous mangions du même riz, comme deux frères.

Un jour, nous allâmes ensemble à la pagode de Gavani. Nous y vîmes plusieurs bandes de fakirs, dont les uns étaient des janguis, c'est-à-dire des fakirs contemplatifs, et les autres, des disciples des anciens gymnosophistes, qui menaient une vie active. Ils ont, comme on sait, une langue savante, qui est celle des plus anciens brahmanes, et, dans cette langue, un livre qu'ils appellent le Veidam. C'est assurément le plus ancien livre de toute l'Asie, sans en excepter le Zenda-Vesta.

Je passai devant un fakir qui lisait ce livre. "Ah ! malheureux infidèle ! s'écria-t-il, tu m'as fait perdre le nombre des voyelles que je comptais ; et de cette affaire-là mon âme passera dans le corps d'un lièvre, au lieu d'aller dans celui d'un perroquet, comme j'avais tout lieu de m'en flatter". Je lui donnai une roupie pour le consoler. A quelques pas de là, ayant eu le malheur d'éternuer, le bruit que je fis réveilla un fakir qui était en extase. "Où suis-je ? dit-il ; Quelle horrible chute ! Je ne vois plus le bout de mon nez : la lumière céleste est disparue" (1). - Si je suis en cause, lui dis-je, que vous voyez enfin plus loin que le bout de votre nez, voilà une roupie pour réparer le mal que j'ai fait ; reprenez votre lumière céleste".

M'étant ainsi tiré d'affaire discrètement, je passai aux autres gymnosophistes ; il y en eut plusieurs qui m'apportèrent de petits clous fort jolis, pour m'enfoncer dans les bras et dans les cuisses en l'honneur de Brama. J'achetai leurs clous, dont j'ai fait clouer mes tapis. D'autres dansaient sur les mains ; d'autres voltigeaient sur la corde lâche ; d'autres allaient toujours à cloche-pied. Il y en avait qui portaient des chaînes, d'autres, un bâton ; quelques-uns avaient leur tête dans un boisseau ; au demeurant les meilleurs gens du monde. Mon ami Omri me mena dans la cellule d'un des plus fameux ; il s'appelait Bababec ; il était nu comme un singe, et avait au cou une grosse chaîne qui pesait plus de soixante livres. Il était assis sur une chaise de bois, proprement garnie de petites pointes de clous qui lui entraient

Miksajoj.

LETERO DE TURKO pri la plezuroj kaj pri lia amiko Bababek.

Kiam mi estis en la urbo Benareso, borde de la rivero Gango, iama patrio de la bramanoj, mi klopodis kleriĝi. Mi sufiĉe komprenis la hindan lingvon ; mi multe aŭskultis kaj rimarkis ĉion. Mi gastis ĉe mia korespondanto Omri. Li estis la plej digna homo kiun mi iam konis. Li estis samreligiano kiel bramanoj, mi mem honorigas min esti islamano : ni neniam parolis unu pli laŭte ol la alia pri Mahometo kaj Bramo. Ni dise lavis nin, ni trinkis la saman limonadon, ni manĝis el la sama rizo, kiel du fratoj.

Iam, ni iris al la Gavani-pagodo. Ni vidis tie plurajn grupojn da fakiroj, el kiuj unuj estis jangioj, tio estas kontemplaj fakiroj, kaj la aliaj disĉiploj de la iamaj gimnosofistoj, kiuj aktive vivis. Ili havas, kiel sciata, sciencoplenan lingvon, kiu estas tiu de la prabramanoj, kaj en tiu lingvo, libron, kiun ili nomas la *Veidamo*. Estas tutcerte la plej malnova libro el la tuta Azio, inkluzive de la *Zenda-vesta*

Mi preterpasis fakiron, kiu legis tiun libron. Ah ! kompatinda nebramano ! li ekkris, vi perdigis al mi la vokalnombrojn, kiun mi kalkulis ; kaj pro tiu afero, mia animo transpasos en la korpon de leporo, anstataŭ iri en tiun de papago, kiel mi povis flati al mi. Mi donis al li rupion por konsoli lin. Post kelkaj paŝoj, malbonokaze mi ternis kaj la bruo, kiun mi faris vekis fakiron ekstazantan. "Kie mi estas ?", li diris ; "Kia abomena defalo ! Mi ne plu vidas mian nazpinton : la ĉiela lumo malaperis" (1). - Se mi estas la kialo, mi diris al li, pro kio vi finfine, vidas pli malproksime ol via nazpinto, jen rupio por ripari la malbonon, kiun mi faris al vi. Reprenu vian ĉielan lumon".

Tiel diskrete elturniĝinte, mi iris al la aliaj gimnosofistoj. Estis kelkaj, kiuj alportis al mi najletojn ege beletajn por premsovi en miajn brakojn kaj femurojn, honore al Bramo. Mi aĉetis iliajn najlojn per kiuj mi najligis miajn tapiŝojn. Aliaj dancis surmane ; aliaj flirtis sur malstreĉita ŝnuro ; aliaj iris ĉiam unupiede. Estis iuj, kiuj surportis ĉenojn, aliaj ŝargoselon, kelkaj havis la kapon en buselo ; cetera la plej bonaj homoj el la mondo. Mia amiko Omri kondukis min en la ĉelon de unu el la plej famaj inter ili. Lia nomo estis Bababek. Li estis nuda kiel simio kaj havis ĉirkaŭ la kolo dikan ĉenon, kiu pezis pli ol sesdek funtojn. Li sidis sur ligna seĝo taŭge garnita per malgrandaj najlopintoj, kiuj eniris en liajn sidvangojn, kaj kredeble li estis kvazaŭ sur satena lito.

dans les fesses, et on aurait cru qu'il était sur un lit de satin.

Beaucoup de femmes venaient le consulter ; il était l'oracle des familles, et on peut dire qu'il jouissait d'une très grande réputation.

Je fus témoin du long entretien qu'Omri eut avec lui. "Croyez-vous, lui dit-il, mon père, qu'après avoir passé par l'épreuve des sept météoroscopes, je puisse parvenir à la demeure de Brama ? - C'est selon, dit le fakir ; comment vivez-vous ?

